



# LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

REDAKCIO  
Paris  
27, Boulevard Arago 27  
PAUL FRUICIER  
ĈEFREDAKTORO.



ADMINISTRACIO  
Szegvár  
Hungarujo (Hongrie)  
PAUL DE LENGYEL  
DIREKTORO.

Ĉiuj klarigoj pri abono, anoncoj, manuskriptoj k. c. estas sur la lasla paĝo.

## KURIOZA SUNHORLOĜO.

S-ro L. J. Gruey, direktoro de la Observatorio de Besançon, presis en «*Revue Bourguignonne de l'enseignement supérieur*» (T. XII. n-ro 1/1902) en la lingvoj esperanta kaj franca la artikolon: «La Sunhorloĝo en Dijon». Tiu ĉi artikolo aperis ankaŭ en aparta broŝuro kune kun la artikolo de S-ro P. A. Dombrovski, en Esperanto sole: «Koncerne la V-an Eŭklidan postulaton» kaj kun antaŭparolo kaj rimarko de la konata al la tuta esperanta mondo profesoro Ch. Méray.

La originaleco de la sunhorloĝo Dijona konsistas en tio, ke 1) ĝi estas aranĝita sur tero mem (sen piedestalo), kaj 2) la observanto, por koni la horon, devas starigi sin sur la ciferplaton, kaj sia ombro montros la tempon.

La unua modelo de tiu ĉi kurioza monumento astronomia — sciigas S-ro Méray — estis konstruita antaŭ la preĝejo de Brou en Bourg de ĝia arĥitektisto Andreo Colomban; en la Dijona parko, sur la bordo de rivero Ouche, ni vidas kopion de tiu horloĝo. S-ro Gruey dubas, ĉu troviĝas ankoraŭ ie sunhorloĝo simila je tiu.

Eble iu el la legantoj volos aranĝi tian instrumenton, simplan kaj kutozan, povantan esti ornamo de iu ajn ĝardeno aŭ placo kaj servi kiel memorigaĵo pri Esperanto; al ili mi proponas tiun ĉi praktikan montron por la konstruo de tia horloĝo sur kia ajn loko de la terglobo.

Por tio ĉi ni devas unue trovi teran placeton, lumigatan de suno la tutan tagon (aŭ almenaŭ pli grandan parton de la tago) dum la jaro kaj desegni sur ĝi meridianan, t. e. sud-nordan linion (vidu la rimarkon post la artikolo); poste preni unu punkton de tiu linio kiel centro kaj per ŝnureto kaj bastoneto desegni ĉirkaŭ ĝi rondon, kies radio ne devas superi mezan homaltecon (alie la ombro de l'observanto iam ne atingos horan markon); post tio, komencante de unu el ekstrepunktoj de la meridiana diametro, dividi la rondlinion en 24 egalaj partoj, \*) kaj fine desegni la diametron orient-okcidentan. La prepara laboro estas preta.

\*) Unue ni dividas en 6 partoj, uzante la teoremon: «la kordo, respondanta al sesona parto de la rondo, estas egala al la radio», poste ĉiun parton ni dividas ankoraŭ en 4.

La horaj markoj de la estonta horloĝo devas esti dismetitaj laŭ elipsolinio, kies granda akso (la plej longa diametro) estas samtempe la orient-okcidenta diametro de la rondo. La longo de la malgranda akso dependas de la geografia latitudo kaj povas esti kalkulita per la «*unua tabelo*», aldonita al tiu ĉi artikolo. La tabelo montras, kiom da milonaj partoj de la rondradio havas la duono de la malgranda elipsakso. Tiun longon ni mezuras de la centro al nordo kaj al sudo, kaj ricevas la ekstrem-punktojn de la malgranda akso.




Fig. 1. (kalkulita por Dijono).

Nun sur la granda akso de la elipso ni serĉas du fokusojn, unu oriente de la centro, la alian okcidente. La interspaco inter la finpunktoj de la malgranda akso kaj la punktoj nomataj fokusoj estas egala al la duono de la granda akso (aŭ al la radio de la rondo); tio ĉi permesas facile trovi la fokusojn. En ilin ni fiksas du akritigitajn bastonetojn. Poste preninte ŝnureton kun du maŝoj en ĝiaj ekstremajoj, havantan la longon de la granda akso, ni metas tiujn ĉi maŝojn sur la bastonetojn en la

fokuso kaj per tria bastoneto streĉas la ŝnuron tiel ke ĝi havu la formon de litero *v* aŭ *A*. Movigante tiamaniere tiun ĉi bastoneton okcidenten kaj orienten, ĝis kie eble, norde kaj sude de la granda akso, ni desegnos la serĉatan elipson. Poste ni strekas la dek kordojn\*) paralelajn al la diametro sud-norda kaj ligantajn la dividpunktojn de la rondo; kie tiuj ĉi kordoj trairos la elipsolinion (ĉiu en du punktoj), tie ni havos la lokojn de la 20 horaj markoj. Al ili ni devas aligi ankoraŭ la 4 punktojn sur la ekstremaĵoj de la aksoj kaj ricevas kune 24. La finpunktoj de la granda akso respon-

pondas al la VI horoj de la mateno kaj vespero, tiuj de la malgranda respon-pondas al la XII de la tag- kaj nokt- mezo. Al la ceteraj punktoj ni devas doni la numerojn laŭ la sama ordo kiel sur la ordinara horloĝo (se ni troviĝas sur la norda duonglobo), t. e. post la XII dekstren devas esti: I, II, III, ... kaj maldekstren: XI, X, IX, ... (Fig. 1.) Por la suda duonglobo la ordo de la numeroj devas esti returna, t. e. maldekstren I, II, ... kaj dekstren XI, X, ...

La cifereplato estas finita. Por uzi ĝin la observanto devas meti sin sur ia punkto de la malgranda akso, sed tiu ĉi punkto ŝanĝas sian lokon laŭ diversaj monatoj (eĉ laŭ la diversaj semajnoj). Decas signi tiujn ĉi punktojn. En la horloĝo Dijona tio ĉi estas farita tiamaniere: laŭlonge la malgranda akso kuŝas mallarĝa longforma ŝtono, kies mezo troviĝas en la centro de la elipso; ĝi estas dividata en 12 placetoj, kiel estas montrite sur la sekvanta figuro: sur la ekstremaĵoj po unu, sur la alia parto po du apude. La placetoj havas sur si la signojn zodiakajn: I. de Akvoverŝanto (respondanta al januaro), II. de Fiŝoj (resp. al febr.), III. de

\*) Corde, Sehne, chord, ĥorda, corda, cuerda, húr.

Ŝafo (resp. al marto) kaj tiel plu. Por koni horon la observanto devas meti sin super la signo zodiaka respondanta al la monato. (Vidu Fig. 2.)

Por agi pli precize, decus marki laŭ la malgranda akso ne la placetojn nur, sed la 7 punktojn, montritajn sur nia figuro laŭ la meza linio, kaj la observanto devus meti sin super




Fig. 2. (Ekvatora tabelo.)

la punkto XI • I, kiam la suno enpaŝas en la signon de Akvoversanto (20 jan.) aŭ en tiun de Pafarkisto (22 nov.), super la punkto X • II, kiam la suno enpaŝas en Fiŝojn (19 febr.) aŭ en Skorpion (23 okt.), k. t. p.; en interaj tagoj li devus meti sin super interaj punktoj, egalmezure movante sin, konforme al pasintaj tagoj, de la punkto I al la II aŭ de la X al la XI.

La punktoj VI kaj XII prezentas limojn — norndan kaj sudan — de kiuj oni devas komenci returnan movadon al la centro. Por konstrui tiun ĉi «vojeton de l' observado», sekve, estas bezone marki la tuj direktajn sep punktojn. La meza el ili troviĝas en la centro de la elipso; la interspacoj de la tri sudaj punktoj de la centro estas sama kiel tiuj de la tri nordaj. Por la lokoj sur la tera ekvatoro tiuj ĉi tri interspacoj estas difinitaj per la 0,203, 0,367 kaj 0,434 \*) partoj de la granda duonakso de la elipso. Por la aliaj lokoj ni devas multoblige tiujn ĉi numerojn per nombro, dependanta de la latitudo, sub kiu ni troviĝas, kaj kalkulata el la supredirita «Tabelo

\*) Tiuj ĉi nombroj estas la tangentoj de 11° 28', 20° 9' kaj 23° 27', kaj la lastaj arkoj estas la deklinacioj de la suno, kiam ĝi enpaŝas en la longitudojn 30°, 60° kaj 90°.

unua»; nur oni devas preni la latitudon ne el la I-a kolono, sed el la III-a.

La signoj de la zodiako nun ne estas uzataj kaj pro tio anstataŭ la sep supredirataj punktoj estas preferinde marki la punktojn, kie la observanto devas starigi sin 1) en la komenco de ĉiu monato kaj 2) en la tagoj de la somera kaj vintra sunstarado; ilia nombro estos 14. Al ili estas eble aldoni la centron de la elipso por la tagoj de la printempa kaj aŭtuna tagnoktegaligo. La interspacojn de tiuj ĉi punktoj de la centro montras la «Tabelo dua» aldonita malsupre. En ĝi la signo «+» montras la direkton al nordo, kaj la signo «—» al sudo. Oni ne devas malmemori, ke la nombroj de la «Tabelo dua», kiel la 3 supredirataj, respondas al la ekvatoro; por la aliaj lokoj ilin oni devas multoblige per la nombro, kalkulita el la «Tabelo unua», kiel estas montrite supre. (Vidu Fig. 3.)




Fig. 3. (Ekvatoraj tabeloj.)

La ekstero de la sunhorloĝo estas kelke diversa por nesamaj latitudoj. Sur la ekvatoro la elipsa ciferplato prenas la formon de rekta linio: dire —, la hormarkoj kuŝas laŭ la orient-okcidenta diametro de la helpanta rondo, kaj

la horloĝo havas la eksteron de rektangula kruco: +, formita per la «vojeto de l' observado» kaj la «ciferplata linio». Mi devas rimarki, ke tie ĉi la horloĝo ne povas montri la horojn dum la tempo de la tagnoktegaligoj, ĉar tiam la ombro de l' observanto falas la tutan tagon laŭlonge la ciferplata rektlinio kaj trapasas ne unu, sed kelkajn markojn. — Sur la lokoj *inter la ekvatoro kaj la tropikoj* la ciferplato havas la formon de mallarĝa elipso, la «vojeto» fariĝas pli mallonga ol antaŭe, sed daŭros eliri ekster la elipso, t. e. la sunhorloĝo havas la formon de la litero greka «phi» aŭ rusa «fert»:  $\Phi$ . — *Sur la tropikoj mem* la «vojeto» ĉesas eliri el la elipso kaj finiĝas precize sur la markoj de la horoj XII; la horloĝo fariĝas simila al la kapo de ŝraŭbo:  $\Phi$ . — Plu, *inter la tropikoj kaj la polusoj* la elipso daŭras fariĝi pli larĝa, kaj la «vojeto», kontraŭe, malgrandiĝas kaj restas ĉiam interne de la elipso; tial la sunhorloĝo servas la formon de la litero greka «theta» aŭ rusa «fita», kuŝanta sur sia flanko:  $\Theta$ . — Fine, *sur la polusoj*, la elipso fariĝas rondo (sama kun la helpanta rondo) kaj anstataŭ la «vojeto» ni havos unu punkton; sekve la horloĝo prezentas la vidaĵon de la signo astronomia por la suno:  $\odot$ .

**Aldonoj.**

TABELO UNUA.

I.	II.	III.	Rimarko: La II-a kolono enhavas sinusojn de la arkoj, trovigantaj en la I-a aŭ kosinusojn de la arkoj en la III-a.
Latitudo:	Malgranda duonakso: $\Delta$ por 1°:		
0°	0,000	90°	
10°	0,174 0,0174	80°	
20°	0,342 0,0168	70°	
30°	0,500 0,0158	60°	
40°	0,643 0,0143	50°	
50°	0,766 0,0123	40°	
60°	0,866 0,0100	30°	
70°	0,940 0,0074	20°	
80°	0,985 0,0045	10°	
90°	1,000 0,0015	0°	
I.	Longo de la vojeto:	Latitudo:	
	II.	III.	

I. Por ekzemplo, kalkulu ni *la malgrandan duonakson* por Dijon, kies latitudo estas 47° (pli precize 47° 20', sed la minutoj ne havas signifon). En la I-a kolono ni prenas 40°, en la II-a al ĝi respondas 0,643. Dekstre de tiu ĉi nombro, inter ĝi kaj la sekvanta 0,766, staras sub la titolo « $\Delta$ » la nombro 0,0123; ĝi kaj la aliaj de la sama kolono montras, kiom pligrandiĝas la malgranda akso, se la latitudo pligrandiĝas per 1°. Ĉe ni la latitudo 47° superas la prenitajn el la tabelo 40° per 7°; tial la nombron 0,643 ni devas pligrandigi per sepoble 0,0123, t. e.  $0,643 \times 7 = 0,086$ . Sekve la serĉata akso =  $0,643 + 0,086 = 0,729$  de la radio de la helpanta rondo aŭ de la granda duonakso de la elipso.

2. Por kalkuli la multobliganton de la interspacoj por la punktoj de la «vojeto de l' observado», ni devas preni la latitudon el la III-a kolono. Ekzemple por Dijon ni havos: al 40° respondas 0,766; al 7° respondas la dekalkulanto —  $0,0123 \times 7 = -0,086$  (NB. Ni havas ne aliganton,




Fig. 4. (Dijona tabelo)

kiel antaŭe, sed dekalkulanton, ĉar tie ĉi, se latitudo pligrandiĝas, la nombroj de la II-a kolono plimalgrandiĝas, ekzemple por 40° ni havas 0,766 kaj por 50° nur 0,643). Sekve por la latitudo de Dijon, 47°, la multobliganto estas  $0,766 - 0,086 = 0,68$ . Tial anstataŭ la nombroj ekvatoraj ni havos:  $0,203 \times 0,68$ ,  $0,367 \times 0,68$  kaj  $0,434 \times 0,68$ , t. e. la nombrojn 0,138, 0,250 kaj 0,295. — (Vidu Fig. 4.)

TABELO DUA.

	por nova stilo	por malnova stilo
1-an de jan.	— 0,424	— 0,390
febr.	— 0,307	— 0,231
mart.	— 0,133	— 0,051
21/8 de mart.	0	0
1-an de apr.	+ 0,080	+ 0,166
maj.	+ 0,269	+ 0,337
jun.	+ 0,406	+ 0,430
21/8 de jun.	+ 0,434	+ 0,434
1-an de jul.	+ 0,427	+ 0,398
aug.	+ 0,326	+ 0,256
sept.	+ 0,146	+ 0,060
23/10 de sept.	0	0
1-an de okt.	— 0,056	— 0,143
nov.	— 0,258	— 0,330
dec.	— 0,400	— 0,429
21/8 de dec.	— 0,434	— 0,434

RIMARKO. La desegno de la meridiano estas la plej malfacila laboro dum la konstruado de la sunhorloĝo. Memorigu ni al la legantoj la plej uzatan metodon por tio. Oni enbatas en teron stangon iom klinitan al supozita nordo; de la stangsupro oni mallevas fadenon kun ŝarĝo; kie la ŝarĝo tuŝas la teron, tien oni enbatas bastoneton kun ligita al ĝi ŝnureto. En 10—10 1/2 horo de mateno ĉirkaŭ tiu ĉi bastoneto oni desegnas per la ŝnureto kaj alia bastoneto tian arkon de rondo, ke la ombro de la stango ĝin kelke transpaŝas. Post kelkaj minutoj la ombro de la stangekstremo tuŝos la arkon en ia punkto, kiun oni tuj markos. Je 1 1/2—2 horo post tagmezo ree la sama ombro tuŝas la arkon en alia punkto, kiu ree devas esti markota. La kordon (aŭ la arkon) inter tiuj ĉi du markoj oni dividas en duonoj kaj tra la punkto dividanta kaj la centro de la arko (la bastoneto kun la ligita al ĝi ŝnureto) oni desegnas linion: ĝi estas la *serĉata meridiano*.

S. Poljanskij.



## BLINDULOJ KAJ KOLOROJ.

Tiun ĉi historieton mi legis en la verkoj de Voltaire.

Tricent blinduloj kune loĝis en malsanejo; ĉiuj estis egalaj, decidis pri siaj aferetoj laŭnombre de l' voĉoj, tuŝe diskonis perfekte monon arĝentan kaj monon kupran; neniuj prenis Brie'an vinon anstataŭ Burgondan; ili pli delikate flaris ol najbaruloj kiuj havis du okulojn; ili, pri kvar sentoj, tre prave parolis kaj konis ĉion permeso lerneblan; ili vivadis pace, feliĉe, kiel povas blinduloj.

Bedaŭrinde, unu el iliaj profesoroj pretendis esplori klare la vidon, sin aŭdigis, intrigis, naskis entuziasmon. Elektite mastro de la komunumo, li komencis majstre juĝi pri koloroj; ĉio pereis.

Tiu ĉi unua diktatoro de Tricent-Blinduloj formis por si konsilantaron, akiris posede ĉiujn almozojn; neniuj kuraĝis kontraŭ li stari.

Li decidis: «Ĉiuj vestoj de blinduloj estas blankaj.» La blinduloj ĝin kredis; ili nur parolis pri siaj belaj vestoj blankaj, kvankam eĉ unu ne havas tian koloron.

De l' tuta mondo mokite, ili plendis al sinjoro diktatoro, kiu ilin tre malbone akceptis, riproĉis novem, paradoksi, ribeli, sekvi opiniojn erarajn de okululoj, maltime dubi pri seneraro de sia estro.

Tiu ĉi disputo dupartiumis ilin.

Por ilin pacigi, diktatoro leĝigis: «Ĉiuj vestoj estas ruĝaj.» Eĉ unu ruĝa vesto ne estis inter ili. Oni mokis ilin pli ol iam; novaj plendoj en la komunumo; kolerigis diktatoro, same ceteraj blinduloj.

Post longa batalo nur permeso ne juĝi kolorojn de vestoj rekunigis la korojn...

Leginte tiun historieton, surdulo konfesis: «Blinduloj senrajte juĝis kolorojn»; sed daŭrigis opinii fortike: «Nur surduloj rajte juĝas muzikon.»

Henrik Tremazo.



## La submetado de Blanka Monto.

Ĝiaj dramoj — ĝiaj herooj — ĝiaj oferitoj.

(DAGRIGO.)

Blanka Monto estis venkita. Restis ankoraŭ submetadi ĝin.

La 1-an de aŭgusto 1787, Saussure entreprenas la supreniron sub la direktado de J. Balmat. Li estas akompanata de sia servisto kaj de deksep aliaj gvidistoj kiuj kunportas fizikajn spertilojn. La 2-an, ili alvenis al *les Grands-Mulets* (grandaj muloj); ĉirkaŭ la 4-a horo ili staris sur ia ebenajeto iomete fosita inter du faldaĵoj de la glaciejo kiu ŝajnis taŭga por haltejo. Tie ili pasigis la nokton; nesciante ili estis haltigintaj sur fendegaĵo.

La 3-an, frue matene, ili daŭrigas la suriradon. Ĉe la fino de *le Grand-Plateau* ili trairas la restaĵojn de lavango, falinta la lastan nokton mem el *les Rochers-Rouges* kaj kies bruego estis vekinta ilin ĉiujn kun ekteruro. Malgraŭ la antaŭtimoj de la gvidistoj, ili daŭrigas iradi. Ili paŝas sur maldika supraĵo glaciita kiu surkovras ok aŭ naŭ colojn da pulvora neĝo kuŝanta sia vice sur dua tavolo el malmola neĝo; kondiĉo kiu estas unu el la plej malfavoraj, kaj kiu okazigis la unuan malfeliĉaĵon de Blanka Monto. Dufoje Saussure estis riskinta la ekstreman danĝeron. Vere mirindaĵo estas ke li ne estis oferito de sia nesingardemo.

Fine ili atingas la supron. Du horoj estis necesaj por transiri 150 metrojn. Saussure estas lacegiĝinta. «La daŭrado de tiu ĉi batalo, — li skribas, — la memoro kaj la sento ankoraŭ nun doloriganta pri la penoj kiujn tiu verko estis kostinta, al mi kaŭzis ĉe mi ian inciton. Kiam mi atingis la plej altan punkton de la neĝo kiu kronas tiun supron, mi piedfrapegis ĝin kun ia kolero.»

Sed la scienculo ne havis la libertempon sin allasi al siaj impresoj: Saussure rapidis komenci siajn eksperimentojn. Staris sub liaj oku-

loj ĉiuj pingloj\*) kaj krutaĵoj kiuj formas la mason de Blanka Monto. Per unu ekvido li povis solvi malfacilaĵojn kiujn oni ne povis klarigi spite multjara laboro. Tuta Eŭropo aplaudis la rezultatojn kiujn tiu ĉi instruitulo akiris riskante sian vivon.

\* \* \*

De la tempo de Saussure, oni suriris Blankan Monton ĝis la supro ĉirkaŭ 1500 fojojn. La kosto de supreniro cetere grandege malaltiĝis. En 1850, ĝi superis 1000 frankojn, hodiaŭ ĝi estas nur 160 fr. Ne estas malmultaj gvidistoj farintaj pli ol 50 fojojn tiun ĉi supreniron. F. Payot kaj E. Cupelin efektivigis ĝin pli ol 70 fojojn, kaj M. Folliguet, nomita kutime la «kapitano de Blanka Monto», 80 fojojn. Nek la neeviteblaj suferadoj, nek la katastrofoj senkuraĝigis la suprenirantojn; kontraŭe ili nur ekscitis ilian kuraĝon kaj incitis ilian deziron. Ni nomu tie ĉi kelkajn el la danĝeroj, kiujn ili riskas.

La plej timindaj devenas de la fakto ke tiu maso da neĝo kaj la glacio, kiu ŝajnas senmova, estas kontraŭe ĉiam en movado. Oni aŭdas mallaŭtan bruon; ĝi estas la glacio kiu rompiĝas. La fendajaĵo, komence nevidebla, grandiĝas iom post iom, kaj iafoje formas fendegaĵojn mezurantajn 30 metrojn laŭ la larĝo kaj 300 metrojn laŭ la profundo. La fendegaĵoj ne estas danĝeraj dum oni povas vidi ilin. Sed la falanta neĝo ofte faras rapide tie ponton sur kiun oni ekpaŝas sen malfido. Oni kredas ke oni staras sur malmolajo kaj oni staras super malplenaĵo.

Iafoje, post la plej varmaj horoj de la tago, kruta deklivo subite seniĝas de la neĝa maso kovranta ĝin. Tio ĉi estas neĝa lavango, kiu

\*) Oni nomas tiel la pintojn tre akrajn de Alpoj.

falegas, balaante ĉion sur sia vojo. Okaze la lavango ruligas grandegajn glaciajn rompaĵegojn je kuba formo. Tio ĉi estas la «*seraka*» lavango.

Kiel estas mara malsaneto, tiel ankaŭ estas monta-malsaneto, same precize difinita. Oni spiradas pene, oni sentas naŭzojn, malplaĉon por la nutraĵoj, soifon neestingeblian, nevenkeblan emon al dormado. Plie, la malvarmo fariĝas neelportebla: gvidistoj, vojaĝantoj revenis iafoje kun frostigitaj piedoj.

Fine, tro multaj estas tiuj kiuj foriris kaj neniam revenis. La nekrologia nomaro de Blanka Monto jam estas longa.

En 1820, doktoro Hamel, naturscienculo rusa, ĵus preteriris *Grandan-Plataĵon*, kiam la neĝa kampo kiun li transiris, glitis subite sur la glacia fondo sur kiu ĝi kuŝis, fortrenante kun si Hamel-on kaj liajn akompanantojn je kelkaj centoj da futoj pli malsupren ĝis fendegajo kien tri gvidistoj englutigis.

En 1866, tri anglaj junuloj, la fratoj Young, plenumis la supreniron sen gvidistoj. Dum la malsupreniro, la plej aĝa, faletinte, glitas kaj kuntiras kun si siajn du fratojn. Baldaŭ antaŭ ili ekaperas larĝa kaj terura profundegajo. Ili

ne povas ĉiuj eviti ĝin kaj la plej juna falante sur la kapo rompas al si la kolajn vertebrojn.

En 1870, S-rino Marke kaj la gvidisto Olivier Gay, ekpaŝinte neĝan ponton malaperas en profundan fendegajon.

La 5-an de septembro de la sama jaro, du Amerikanoj, S-roj Randall kaj Bean, kaj la Skotlandano Corkindale ekiras Blankan Monton kune kun ok gvidistoj. Ili ĉiuj estis pereontaj. Post dekdu tagoj, estis trovataj sur la supro de *Mur de la Côte* (muro de la deklivo) Sinjoro Corkindale kaj du gvidistoj kuŝantaj sur la flanko; iom pli supre la senvivaj korpoj de doktoro Bean kaj de unu gvidisto, tute frostigitaj. Oni ne povis trovi la ses aliajn mortintojn.

Per kelkaj notoj el poŝkajereto trovita en la vesto de S-ro Bean ni povas diveni la suferadojn kaj turmentegojn de tiu ĉi malfeliĉulo. «*6-an de sept.* Ni pasigis la nokton en groto fosita en la neĝo; mi estis malsana la tutan nokton. — *7-an de sept. matene.* Grandega malvarmo. Multe da neĝo falas senĉese. — *7-an de sept. vespere.* Ni havas nenion por manĝi; miaj piedoj estas jam frostigitaj; mi estas tute senfortiginta.»

(DAŬRIGOTA.)

El revuo «Legajoj por ĉiuj» tradukis

A. Dumont kaj A. M. Boyadjian.



## La stelo de l' Esperanto.

Fragmento.

Estis maltrankvila, malbela aŭtuna vetero: bruis furioza ventego, pelanta nigregajn nubojn en neĉirkaŭrigardebla spaco de l' ĉielo; falis malgrandguta pluvo, kiu devigas ĉiujn kun pli granda plezuro sidi dome ol promeni ekstere por gluti freŝan aeron; regis plena mallumo, en kiu oni ne povas kuraĝe iri eĉ laŭ la plej konata vojo...

Sed jen, subite, en la zenito mem, la mallumo kaj la nubego traŝirigis kaj de tie, en mallumeĉielblua peco, ekaperis bela, brilanta per diverskoloraj fajreretoj, ŝajneviva stelo, loĝanta al si rigardon de homo...

Ĝi estis la stelo de l' Esperanto kiel ideo kaj lingvo, kaj ambaŭ kune.

T. Ŝĉ—ij.



## LEGOMEJISTO KAJ FILOZOFO.

— Fablo de la rusa verkisto *Krilóv.* —

Libera traduko, dediĉita al partianoj de Volapük, kiuj riproĉas Esperanton, ke ĝi ne havas sciencan indon kaj ke ĝiaj partianoj ne estas instruitaj lingvistoj.

Printempe, legomejisto en sia legomejo, kun fosilo en la manoj, fervore laboris, preparante la teron, por semi kukumojn. Al li venis lia najbaro — filozofo, tre instruita homo, kiu tre amis la naturon entute, kaj aparte la legomejan aferon. Li multe legis kaj parolis pri tiu ĉi afero kaj eĉ decidis mem, per propraj manoj, prilabori sian legomejon.

— Nu, najbaro, — moke diris la filozofo al la legomejisto, — Ĥiom ajn vi penu kaj ŝvitu, via legomejo estos vera dezerto kompare kun la mia. Mi eĉ tre miras, ke vi ĉe via legomejo ankoraŭ tute ne malriĉegiĝis. Vi, kompreneble, lernis nenian sciencan?

— Jes, — respekte respondis la legomejisto, — mi ne havis tempon por tio ĉi. Cetero, ankaŭ sen scienco Dio donas al mi paŝon, por mia diligenteco kaj senĉesa laborado.

— Malklerulo! — ekkriis kolere la filozofo, — vi kuraĝas malŝati la sciencan?!

— Ne, sinjoro, — humile respondis la legomejisto, — mi tute ne faras tion ĉi. Mi ĉiam estas preta transpreni de la scienco ĉion bonan kaj utilan. Sed estas jam tempo prepari la teron por la semado; tamen vi ankoraŭ eĉ ne komencis tion ĉi.

— Mi ne havis tempon, — rediris la filozofo. — Mi ĉiam legis specialajn librojn, kaj ankoraŭ ne decidis fine, per kio pli bone fosi la teron: per plugilo, aŭ per fosilo.

La najbaroj disiĝis. La legomejisto daŭrigis sian laboron, kiel antaŭe, kaj la filozofo ankaŭ ne estis senokupita: li senĉese legis librojn kaj laboris en la legomejo. Apenaŭ io komencis kreski, tiam la filozofo trovas novaĵon en la libroj kaj elfosas ĉion semitan, ree transplantas ĝin laŭ nova maniero kaj tiel plu.

Kia do estis la rezultato? La legomejisto havis sufiĉe bonan rikolton, kaj la filozofo restis sen kukumoj.

M. S. Rakitski.



## LA ISLANDA KANTO.

De Grimúr Thomsen. — El islanda lingvo.)

*Bolas varma ŝpruc-fontaro,  
Kantas cignoj sur la maro:  
Jen l' islanda kant'!*

*La riveroj tondre krakas,  
L' akvofal' la ŝtonojn hakas:  
Jen l' islanda kant'!*

*Kantas birdoj en l' insuloj  
Sur la plataj rok-tabuloj:  
Jen l' islanda kant'!*

*Ondoj muĝas kontraŭ rokoj  
Kun koleraj laŭtaj voko:  
Jen l' islanda kant'!*

*Kaj en via propra koro  
Vivas tiu bel-sonoro,  
Jen l' islanda kant'!  
Dum feliĉ' kaj dum sufero  
En vi sonas tra l' aero —  
Jen l' islanda kant'!*

Trad. R. Nordenstreng kaj A. Kofman.





# TRA LA MONDO ESPERANTISTA.

## Skribsistemo Braille por Blinduloj.

### Esperanta alfabeto por la lego.

Ni presis sube figuron de l' alfabeto de Braille por blinduloj, aranĝita por apartaj literoj Esperantaj.

Tiu arango, farita de Svedaj Esperantistoj, estis interkonsentita la 23-an de septembro lasta, en Genevo, de S-roj Thylander kaj H. G. Andersson por Svedoj, Th. Cart por Francoj, J. J. Monnier kaj la direktantino de blinddomo Recourdon en Lausanne, por Svisoj.

La Braille' alfabeto konsistas el specialaj punktliteroj, reliefe pikitaj en dika papero, tiamaniere ke la blinduloj povu ilin legi, palpante per la fingroj sur la punktoj.

La tuta alfabeto estas apogata sur ĉeftipo konsistanta el 6 punktoj, kiuj ricevas ĉiuj po unu ordnumero. Oni uzas 1, 2, 3, aŭ pli da punktoj laŭ la literoj.

Por skribi, oni uzas specialan larĝan liniilon, traboritan je vico de rektangulaj truoj flanke unu de la alia. En ĉiu truo oni povas skribi po unu litero, per pikileto, lasante libera (ne skribita) unu truon inter ĉiu vorto. Oni skribas de dekstre maldekstren, laŭ returna ordo de la literpunktoj, tiamaniere ke la blinduloj povu legi sur l' alia reliefa flanko de l' papero de maldekstre dekstren laŭ ordinara maniero.

La ĉi-tiea figuro montras la literojn laŭ ilia formo dum la lego.

Ni metis nur signojn de literoj; — ĉiuj aliaj signoj (ciferoj, punktoj, k. c.) estas samaj kiel en nacilingvoj. Specialaj por blinduloj lernolibroj, ekzercaroj, kursoj, vortaroj, kaj eĉ gazeto estas nun en preparado aŭ en presado. Ni detale reparolos pri ĉiu afero, kiam tempo venos. «Lingvo Internacia» estas fiera, ke ĝi enkondukis tiun laŭdindan entreprenon en la publikon, kaj ĝi ne ĉesos subtenadi ĝin entuziasme kaj tutkore. Esperanto estas favorege akceptata de ĉiuj blinduloj kiuj konatiĝas kun ĝi, kaj eĉ multaj viduloj, kiuj ĝis nun restis skeptikaj aŭ malamikaj al ni, laŭdas kaj helpas nin de l' tempo, kiam li vidis, ke Esperanto povas treege malpli malfeliĉigi la sorton de niaj kompatindaj fratoj.

Tial ni petegas ĉiujn niajn amikojn: helpu al ni kaj disvastigu tiun entreprenon inter blinduloj kaj inter viduloj. Ni presis propagandajn foliojn, kiuj povas esti uzataj tiel bone por ordinara, kiel por speciala problindula propagando. Tiuj folioj ekzistas hodiaŭ nur en la lingvo franca: kiel eble plej baldaŭ ni presos ilin ankaŭ en aliaj lingvoj. Sed por tio kaj ankaŭ por preso de lernolibroj necese estas havi sufiĉan monon: — tial ni petas niajn malavarajn amikojn: «ne forgesu la blindulojn». Eĉ plej malgrandaj sumoj treege akcelas nian aferon, kaj ni dankeme citos en la gazeto ĉiun, kiu oferos por tio peceton el sia mono, tempo, koro aŭ spirito.

a	b	c	ĉ	d	e	f	g	ĝ	h	ĥ	i	j	ĵ
k	l	m	n	o	p	r	s	ŝ	t	u	ŭ	v	z

### Lingvo Internacia.

De l' redaktoro de L.I. oni povas ricevi a frankite: a) Lernolibron, kun ekzercaro kaj duobla vortaro en lingvo franca (per literoj Braille). Kosto 5 frankoj; b) propagandajn foliojn en lingvo franca (kun klarigoj pri Blinduloj kaj Esperanto, mekanismo de Esperanto, figuro de l' alfabeto Braille por Esperanto, k. c. . .) po 0 f 50 centimoj por 25 folioj.

La redaktoro ankaŭ sendas ĉiujn sciigojn kaj informojn pri tiu entrepreno kontraŭ poŝtmarko aŭ poŝtkarto por la respondo. Li akceptas kaj kolektas monoferojn, kaj kvitanças ilin en la gazeto.



## KRONIKO.

### Ruslando.

— En Peterburgo S-ro K. Ostanievič fondis librovendejon sub la nomo «Esperanto».

\*

— En Minsk S-ro Vs. Lojko presigis en n-ro 1372 de «*Sjevero-Zapadnoja Slovo*» (Nord-Okcidenta parolo) tradukon de «Sur l'observa turo» kun noteto pri ĝia eltiro el «Lingvo Internacia».

### Belgolando.

— Esperanto parolata. S-ro J. Jamin skribas al ni, ke S-ro T. Kanef, el Kalofer, bulgara Esperantisto, vizitis lin en Bruselo. S-ro Kanef ne parolas la francan lingvon, li ĝin legas nur malmulte. Li ne konis iun ajn en Bruselo, sed alvenis kuraĝe, sciante ke tie esperantistojn li trovos. S-roj J. kaj K. interparoladis dum tri tagoj, kaj ili «*komprendis unu la alian sen malfacileco, tiel bone kiel se li (S-ro K.) parolus france*». S-ro K. loĝados en Bruselo; li intencas lerni francan lingvon, kaj alesti en la Brusela Universitato al la kursoj pri politikaj kaj ekonomiaj sciencoj. Ili ambaŭ serĉis aliajn Bulgarojn, kaj feliĉe trovis kelkajn. Tiel Esperanto helpis multe al S-ro K. kaj faris al li servon tre utilan.

\*

— Kursoj pri Esperanto rekomencis en Bruselo kaj Antverpeno. La Bruselaj kursoj kalkulas tridek-kvin lernantojn ĉe la «Cercle Polyglotte» kaj dekdu ĉe «l' Extension de l' Ecole normale». La Antverpena kurso enhavas dekok lernantojn; ĝi estas *paganta* kurso.

«La Belga Sonorilo» anoncas detale pri ĉio tio ĉi, kion afable antaŭ la eliro sendis al ni la redaktoro S-ro Jamin.

### Germanlando.

— Grupo Esperantista fondiĝis en Kiel. Sin turni al S-ro Ed. Müller, 2, Mühlinstrasse.

\*

— Esperanto parolata. Dum la somero, S-ro Pagnier, el Parizo (122, str. Réaumur) vizitis S-ron D-ron Schmidt en Gotha. Ili interparolis nur per

Esperanto, kaj tre facile babiladis kaj interkompreniĝis dum tuta tago.

\*

— En Leipzig, profesoro Schauerhammer, faris grandan laŭdon de Esperanto ĉe kunveno de «Verein für neuere Philologie zu Leipzig» (Unuiĝo por nova filologio en Leipzig), kaj montris ke Esperanto tute solvas la problemon de komuna interkomprenilo. Profesoro Hartmann venis post lia parolado legi el-tirajojn el «Hamleto». La aŭskultintoj estis tute mirigitaj de l' belsoneco de la lingvo kaj disiĝis, gratulinte S-ron S. pro liaj sciigoj pri ekzistado de tia lingvo, kun firma decido ĝin ellerni.

La gazeto «Leipziger Tageblatt» raportis tre detale pri tio en la n-ro de l' 29-a de okt. 1902.

\*

— La gazeto «*Wochenschrift für Scheithauers Stenographie*» presas en ĉiu numero (komencinte de la 80-a) grandan esploron pri problemo de internacia lingvo. En la komenco de l' artikolo estas dirite ke «Esperanto genie solvas la problemon», kaj ke la artikolo nur tion ĉi tute elpruvos.

— En la gazeto «*Mitteilungen der Deutschen Zentralstelle für internationalen Briefwechsel*» la redaktoro, profesoro M. Hartmann, faris longan priskribon pri «mirindaj ecoj de Esperanto».

### Svislando.

— Publikan paroladon por Esperanto faris en Genève kaj en Neuchâtel S-ro Scheler, profesoro de elparolado en Lausanne. S-ro Renard kiu skribis tion ĉi al ni, aldonas: «S-ro Seleznjov, rusa esperantisto, kaj mi mem disdonis propagandajn broŝuretojn ĉe l' fino de l' kunsido, kiu havis grandan sukceson. Estas dezirinde ke Esperanto disvastiĝu baldaŭ en Svislando kiel en aliaj landoj. Ni organizis skriban Rondiranton, kiu konatigas kaj unuigas inter si la Svisajn Esperantistojn.»

### Aŭstrolando.

— S-ro Kajš skribis al ni ke li presigis en la gazeto «*Vom Guten das Beste*», organo

de l' koresponda societo «Weltverein» en Munĥeno (Germanl.) artikoleon komparantan vortarojn de tri lingvoj: Volapük, Bolak, Esperanto. En la fino estas dirite: «Tradukon mi forlasas intence, ĉar mi esperas ke, el tri mondlingvoj, almenaŭ unu estas komprenebla, kiu pro tio estas la vera mondlingvo.» La devizo de tiu artikoleto estis la vortoj de D-ro Esperanto sur siaj unuaj broŝuroj: «*Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas ĝin nur tiel nomi.*» S-ro K. atendas grandan bruon inter Volapükistoj pro tiu artikolo, ĉar tiuj sinjoroj presigas artikolojn por Volapük preskaŭ en ĉiu numero de l' nomita gazeto.

El fajro venos pura oro.

### Hungarlando.

— **Renkontiĝo de diverslandaj Esperantistoj.** S-roj Valdemar kaj Alex Langlet, membroj de la Klubo Esperantista Stokholma, dum liaj vojaĝoj vizitis Hungarlandon.

En Budapeŝt ili vizitis la hungarajn (bedaŭrinde malmultajn) esperantistojn, kiuj sen ripozo klopodas disvastigi nian lingvon.

S-roj Langlet akompanataj de la hungara esperantisto S-ro K. Seper faris ekskurson en la *Hortobágy-puszta* (stepo Hortobágy), kie ili kune pasigis 9 tagojn.

Kie ili estis, ĉie kun granda atento oni aŭdadis ilian paroladon; ili laŭdis kaj miregis la taŭgecon de Esperanto.

### Itallando.

— **Nova societo, nova gazeto.** Kun granda gojo ni ricevis la 1-an n-ron de gazeto en lingvo itala, kies titolo estas «*L' esperantista*» kaj kiu sciigis nin pri la jusa fondo de Itala Societo por la propagando de Esperanto. Kun la gazeto estas eldonitaj propagandaj folioj por Italoj.

Estraro de la nova societo estas S-roj: Komandoro *Tosi-Bellucci*, P. — Doktoro *For-*

*miggini* kaj Profesoro *Bicknell*, SP. — Grafo *Gallois*, Sekr. — Honoraj membroj: D-ro *Zamenhof* kaj D-ro *Marignoni*.

Redakcio kaj administracio de l' gazeto: Torino, via S. Secondo, num. 22.

Abonkosto: Itall. 2 fr., aliaj landoj 4 fr. Propagandaj folioj: 100 = 2 fr., 500 = 9 fr., 1000 = 15 fr.

La nova gazeto povos alporti grandan helpon al nia afero en Itallando, kie Esperanto estas ankoraŭ preskaŭ tute ne uzata. Grandan sukceson ni deziras tutkore al la sindonemaj entreprenintoj.

### Francolando.

— **Esperanto parolata.** S-ro Seleznjov nun estas en Parizo, traveturinte Grenoblon, Ljonon kaj Dijonon, kie li estis korege akceptita de esperantistoj. Alveninte Parizon sen antaŭsciigo, li staris tre embarasata sur la mezo de l' strato, serĉante sur urbokarto vojon por aliri al la redaktoro de L. I. Ĉar li ne konas la lingvon francan, neniu povis doni sciigojn al li, kaj trovi sola sian vojon en Parizo ne estas afero tre facila. Subite alproksimiĝas sinjoro kortuŝita de lia mieno: «*Puis je vous aider en quelque chose, Monsieur?*» (ĉu mi povas iel vin helpi, Sinjoro?) — demandas la novalveninto. Silentas S-ro Seleznjov. — «*Sprechen Sie deutsch?*» (ĉu vi parolas germane?) — daŭrigas germane la servema sinjoro. — «*Njet! njet!*» ripetas S-ro Seleznjov. — «*Do you speak english?*» (ĉu vi parolas angle?) ankoraŭ demandas angle la alparolanto. Sed vane. S-ro Seleznjov energie balancas la kapon, kaj kun grandaj gestoj ekklarigas ruse, ke li ĵus alvenis, ke li serĉas loĝejon de Esperantisto... «*Esperantisto!*» ekkrias tiam la servema sinjoro, kiu ekkaptis tiun vorton, «*vi estas Esperantisto! sed mi ankaŭ estas Esperantisto!*» — Ambaŭ ekmirego, tuja interbabilado kaj kuna irado ĝis la loĝejo de l' redaktoro de L. I., kiu ankaŭ ekmiregis aŭdante tiun neverŝajnan, tamen veran fakton.

Tiel S-roj Seleznjov, Berthelot (ĉu mi diris ke tiel estas nomata la servema sinjoro?) kaj Fruictier ricevis ankoraŭ unufoje pruvon superfluan, sed tamen ĉiam utilan, pri taŭgo de Esperanto kiel parolata lingvo.

— **Esperanto ĉe kongresoj.** Ĉe la lasta «*Congrès de l' Enseignement*» (kongreso por l' instruado) en Ljono, estis decidite unue en aparta sekcio, poste en la ĝenerala kunsido ke la *proksima kon-*

*greso, kiu fariĝos en la jaro 1903, sin okupos speciale pri Esperanto mem.*

— En kongreso de socialistoj en urbo Alger ankaŭ estis decidite, ke la estonta kongreso traktos problemon de komuna internacia lingvo.

\*

— **Novaj Grupoj.** En nia lasta n-ro ni jam parolis pri fondo de Grupo Esperantista en Marseille. Tio ĉi fariĝis dank' al la klopodoj de S-roj *Barthalet, Stephane* kaj D-ro *Rapine*.

En Annecy, D-ro *Boucon* fondis Grupon, kiu aliĝis S. p. p. E.

\*

— **Esperanto ĉe blinduloj.** S-ro *Monnier*, sekretario de l' Problindula Svisa Societo skribis longan artikolon por Esperanto en la gazeto «*Louis Braille*» (Gazeto por blinduloj).

— S-ro *Cart* konvinkis S-ron *Guilbot*, kiu estas instruitega blindulo, profesoro de fremdaj lingvoj, k. c. por blinduloj.

— Dank' al peto de S-ro *Bourlet*, la «*Touring-Club*» oferis 200 frankojn por propagandi Esperanton inter blindularo.

\*

— **La gazetistaro.** Granda nombro da gazetoj enhavis aŭ noteton aŭ artikolon pri Esperanto dum la du lastaj monatoj. Pro manko da spaco ni ne povas ilin ĉiujn citi. Ni nomu nur el la plej gravaj «*La République de l'Isère*» (21. X) kiu raportas pri vojaĝo de S-ro *Seleznjov*, kaj «*The Boulogne and North of France Times*» kiuj enhavas en du numeroj longan artikolon de S-ro *Wood*.

\*

— **Kursoj.** Ekzistas nun 12 kursoj en Parizo. Ili estas farataj de S-roj *Arnoult, Boitel, Berthelot, Cart, Chavet, Clarac, de Coppet, Fruictier, Wintzweiller*.

\*

— **Kunlaborantojn** deziras la «*Revue du Touring-Club de France*» kiu intencas enpresii artikolojn en Esperanto precipe pri kuriozaĵoj en diversaj landoj, sciigoj interesantaj turistojn, k. t. p. Tiu ĉi revuo estas dissendata ĉiumonate al la membroj de T. C. F. kaj tio ĉi estos bonega propagando inter ĝiaj 75000 abonantoj. — Sin turni al S-ro *Bourlet*, 22 Avenue de l'Observatoire, en Paris.

\*

— **La komitato de S. p. p. E.**, post iniciato de S-ro *Bourlet*, subtenata de S-roj *Cart* kaj *Fruictier*, decidis proponi al la membroj, ke oni aldonu la vorton «*Franca*» al la titolo de l' Societo.

## Hispanlando.

— En **La Coruña**, S-ro *Monteagudo* daŭrigas enpresigi longajn artikolojn por Esperanto en ĉiu numero de l' komerca gazeto «*El Dependiente*» kiu anoncis per Esperanta teksto sur la supro de l' unua paĝo ke ĝi «ĉiam subtenos nian ideon».

## Angllando.

— **La gazetistaro.** «*Rewiew of Rewiews*» (oktobra numero) enhavas grandan laŭdon pri Esperanto de direktoro mem, S-ro *Stead*. — S-ro *Geoghegan* presigis artikolojn por nia lingvo en n-roj aŭgusta kaj oktobra de l' Dublin'a Revuo «*Celtia*»; — S-ro *O' Connor* leteron pri la sama punkto en «*Daily Mail*».

(El *L'Espérantiste*.)

\*

— **Grupo Esperantista**, kiu enhavas jam 30 membrojn, fondiĝis en Keighley dank' al klopodoj de nia fervora samideano S-ro *J. Rhodes*, post parolado publika de S-ro *Charlier*, sub prezido de S-ro *H. Beaver*, prezidanto de l' komerca ĉambro. La urbestro ĉeestis en la kunveno.

Alia grupo baldaŭ fondiĝos en Edimburgo. — Pli detalajn sciigojn ni alportos en nia venonta numero pri tiuj novaj sukcesoj de Esperanto.

oo

## BIBLIOGRAFIO.

— **Holanda traduko** de «*Esperanto en dek lecionoj*» eliris el la presejo de S-ro *Witteryck*, kiu faris mem la tradukon. La verko bone eldonita havas bonan mienon kaj kostas nur 50 centimojn.

— **Corrigé des Exercices de l'«Esperanto en dix leçons»** de S-roj *Cart* kaj *Procureur*. Tiu verketo, pri kiu ni jam parolis en nia antaŭa numero, kostas 50 centimojn.

— **Corrigé de «Grammaire et Exercices»** de S-ro de Beaufront; kostas 75 centimojn.

Pri la unua verko mi havas nenion por diri, unue ĉar mi jam parolis pri la kurso mem, kies al-faro ĝi estas; kaj poste ĉar mi tute nescias la hollandan lingvon. Sed pri la du tradukoj anoncitaj poste, mi nur diros unu aferon, negravan kiel la verkoj, kiujn ĝi rilatas, sed tamen iom interesan en ĝenerala temo: kial ĉiam traduki Esperantan tekston per laŭvorta traduko nacia, malagrablega kaj teda? Ekzemple en la traduko de «*La feino*» farita de S-ro de Beaufront, oni vidas nur laŭvortan tekston francan, kun, inter krampoj, ankoraŭ pli laŭvortaj aliaj frazoj! Estas certe tre bone klarigi al la lernanto per laŭvorta traduko la konstruon Esperantan; sed apude oni bone farus ankaŭ, metante literaturan tradukon kiu montrus manieron esprimi Esperante naciajn idiotismojn. Tio ĉi estis des pli facila en la nuna okazo, ke «*La feino*» de D-ro Zamenhof estas mem precize Esperanta traduko de rakonto de l' literaturisto Charles Perrault, kiu skribis en ĉarma stilo dum XVII-a centjaro tiujn famajn fabelojn, kiuj dolĉigis niajn infanajn jarojn, kaj sub naiva formo enhavas oftege profundajn pensojn.

P. F.

— **Vokala muziko de Esperantistoj** estas serio de romanoj publikigataj en lingvoj rusa kaj Esperanto. Jam eliris tri: I. *Buliĝas kiel blanka bed'*. — II. *Hispana romano*. — III. *La nimfo*.

Poezioj estas tradukitaj en Esperanto de S-ro A. Fjodorov, kaj la muzikon verkis S-roj B. Fjodorov (I. kaj III.) kaj F. de Ménil (II.).

Spaco mankas por plene analizi hodiaŭ tiujn verkojn. Mi diros nur, ke la du lastaj plaĉas al mi pli ol la unua, kiu tamen posedas fortepianan akompanaĵon, kiu bone subtenas la voĉon. Tiu eco mankas iom al II kaj III, precipe al III. Fine, en ĝenerala maniero ankaŭ oni povas diri, ke la akompanaĵoj estas iom malfacilaj: tio ĉi montras eble la sciencan de l' verkinto, sed deturnigas la ludantojn kaj kantantojn, homoj neforgesotaj en tiu speco de verkoj.

Tamen tiu entrepreno estas laŭdinda kaj subteninda, kaj muzikamantaj Esperantistoj ricevos de ĝi grandan plezuron. Ni esperu ke la eldonanto baldaŭ alportos ankoraŭ aliajn verkojn al la publiko, inter kiuj kredeble unu en durtono, la tri suprenomitaj estante ĉiu en moltono skribitaj.

H. R.



## DIVERSAĴOJ.

### RESPONDO

al S-ro P. Ahlberg, pri lia demando sur la paĝo 127-a de *Lingvo Internacia*.\*)

La frazo, kiun vi citas, devas esti anstataŭita per «*ĉiu retrovus en ĝi nenion aŭ preskaŭ nenion*». Mi efektive ne povus diri «*neniu retrovus ion aŭ preskaŭ ion*», ĉar mi ne vidas klare kio estus «*preskaŭ io*» tie ĉi.

En verko plej severe ekzamenita, plej atente korektita, oni tre bedaŭrinde ne povas atingi perfektecon absolutan de korekteco. Tio ĉi estas, ho ve! tro konata de ĉiu homo, kiu ver-

kas kaj presigas. Malgraŭ ĉiu penado restas ankoraŭ, en libro plej bone korektita, io korektebla, tiom pli ke la kompostistoj iafoje ŝanĝas iom, en la lasta preso, kion vi skribis, aŭ ne faras plene la montritajn korektojn. Ekzemple, por la 56—57-a numero de *l' Esperantiste*, sub la rubriko *Internacia Korespondado Esperanta*, mi certe donis la tekston «*li devas pagi 0 f 50 por linio aŭ parto da linio plie*»; kaj mi trovis sur la presita ekzemplero, en la monato septembro, «*po linio, de linio*». Mi povus citi, ĉar mi ĝin notis, frazon de *Hamleto*, en kiu tre certa eraro de komposto prezentas, sub la plumo de doktoro Zamenhof, perfektan idiotismon Hungaran per uzo de la verba formo en *u*.

\*) Tiun ĉi respondon, kiu estis jam legata en *l' Esperantiste*, ni presas nur pro la peto de ĝia aŭtoro.  
La Red.

La eraro, kiun vi montris en mia verketo, estos tiom pli certe korektita en la 3-a eldono, ke rimarkinte ĝin en okaza relego de l' para-grafo sur kiu ĝi kuŝas, mi ĝin notis por korekto. Mi tamen tre dankas vin pro la montrado afabla.

Eble Francoj estas inklinaj enmeti en Esperanton la idiotismon de duobla neo, tiel same kiel alinacianoj enmetas en ĝin tre ofte idiotismojn de sia lingvo, tute ne rimarkante tion ĉi. Sed se vi legas l' *Espérantiste* kaj miajn aliajn verkojn, vi devas konfesi, ke mi faris ĉion eblan por defendi miajn sampatrujanojn kontraŭ la idiotismo de duobla neo komuna inter kelkaj lingvoj. Por pli certe atingi tiun ĉi celon mi eĉ aldonis rimarkon tute specialan al la 12-a regulo de D-ro Zamenhof kaj mi citas la ekzemplon « *sen ia lerno* », por ke oni ne diru « *sen nen ia lerno* ». Tial mi pli ol kiu ajn miris, legante en la *Supplément au dictionnaire Esperanto-Français* la frazon pri kiu vi speciale skribas.

Nun permesu, ke tre amike mi demandu vin kial vi diras « *kaŭze de tio ĉi* » kiam pli simple D-ro Zamenhof ĉiam diris « *pro tio ĉi* » aŭ « *tial* »? Kredeble el imito de sveda aŭ franca dirmaniero.

Finante mi rimarkigas, ke se ia Franco eraras en privata letero, kiel vi diras pri kelkaj, li tiam ne devas esti konsiderata kiel aŭtoro, ĉar li ne pli multe intencis skribi por la publiko ol ĉiu alinaciano eraranta en sama okazo. Li ne devas pli maltrankviligi vin ol tiu ĉi lasta, ĉar tiam ili ambaŭ neniel pretendas prezenti sian stilon kiel modelon: per plumo kuranta, pro tro granda rapideco kaj ne sufiĉa pripenso, multaj el ni, kaj eble ni ĉiuj, Francoj aŭ ne, faras iafoje kelkajn erarojn skribante Esperanton, same kiel en la patra lingvo. Sed tiam ni ne estas aŭtoroj, sed privataj skribantoj, kulpaj senintence. Cetere en ĉiu supozo la principoj donitaj de D-ro Zamenhof restas kaj devas ĉiam restadi la ĉefega leĝo montranta la veran vojon kontraŭ ĉiu eraro de kiu ajn naciano.

L. DE BEAUFONT.

## OPINIOJ.

Al la letero de S-ro A. Z—v (L. I. 1902, p. 126) pri la artikolo « la ».

La sama demando estis por mi objekto de pensado dum multe da tempo, kaj fine mi venis al la konkludo ke l' oportuneco de l' arti-

kolo estas malpli granda ol la malfacileco de ĝia uzado. Kelkaj esperantistoj (S-ro Lojko kaj a.) ne uzas l' artikolon, sed ilia skribo ne nas-kas konfuzon. Por ruso, ne scianta fremdajn lingvojn, l' artikolo estas ĥinaĵo. La francoj, angloj, germanoj kaj aliaj nacioj havas malsamajn regulojn pri tiu ĉi punkto. La plej bone estus forjeti tiun ĉi lingvan elementon, kiu donas lokon nur al embarasoj.

A. Kofman.

## El la Gazetaro.

### Flandranoj kaj Esperanto.

El S-ro Seynaeve en *La Belga Sonorilo* (n-ro 2).

Kial do la Flandrano malantaŭe restadus en tiu belega movado, kiu intencas alproksimigi la gentojn, detruu la barilojn, kiuj senkaŭze malunuigas ĉiujn anojn de la sola homa familio; kiu intencas efektivigi projekton, kies rezultatoj tiel individuaj kiel anaraj, tiel sciencaj kaj komercaj kiel homamaj, kies rezultatoj vere aliformigos la mondon?

Kial la Flandrano malantaŭe restadus, kiam li ricevus, alprenante lingvon internacian, tiel estimindajn bonaĵojn? Ĉar la lingvo Flandra, kvankam uzata en lokoj sufiĉe multaj sur la tero, estas tamen komprenata nur de malgranda kvanto da homoj; tuj kiam li deziras iom pligrandigi siajn gentajn interrilatojn, la Flandrano devas lerni tri fremdajn lingvojn.

« Brave! Progresado estas vivo!! »

El D-ro Uitterdijk, en *La Holanda Pioniro* (n-ro 2).

La vortoj de S-ro Kalis: « La Holanda Pioniro, gazeto kiun kredeble ĉiuj holandaj Esperantistoj legas... », venigis rideton sur miaj lipoj.

Kiam oni vidas la nomaron de niaj abonintoj, oni ne povas restadi optimisto. La nombro da Esperantistoj en nia lando jam estas grandeta, precipe en Amsterdamo. Eble ankaŭ ili kredas, ke nia mondlingvo fine venkos kaj tial... ili atendas tute trankvile.

Mi estas certa, ke la apero de l' Pioniro faris plezuron al ili, se okaze ili eksciis ĝian ekziston: « Brave! Progresado estas vivo!! »

Sed neniam ili povas agadi sen mova forto; precipe kiam ĝi devas bori tra fortikaj muroj de antaŭjuĝoj, oni bezonas por tio energion kaj monon.

## Neebleco de parolata lingvo tutmonda.

El S-ro Beauvais en *Concordia* \*) (n-ro 95).

Ekzistas ja nerenversebla barilo kontraŭ universaliĝo de fonetika, parolata lingvo: la elparolado.

Mi supozas, ke Franco mirinde posedas Volapükon kaj povas senbalbute ĝin paroli; kiamaniere li elparolos ĝin? Li elparolos ĝin *kiel francan lingvon*; Anglo *kiel anglan lingvon*; Ruso *kiel rusan*. Sed tiam tiu tiel klara (?) organo fariĝos nekomprenbla por ĉiuj. Kaj tio, kion mi diras, estas ankaŭ vera por Lingvo Blua, por Esperanto, por ĉiuj parolataj lingvoj.

## Volapük, Idiom Neutral, Esperanto.

El profesoro Schauerhammer en *Leipziger Tageblatt* (29. okt.).

La lingvo internacia devas certe esti kiel eble plej simpla kaj facila. Volapuko, eltrovaĵo de l' Badano Schleyer, ne plenumas tion ĉi. La gramatiko estas ja bona rilate al naciaj lingvoj, sed la libere elpensitaj, malbelsonaj vortoj estas tiel malfacile eklerneblaj, ke oni bezonas senĉesan helpadon de l' vortaro por skribi frazon iom longan. La sensukcesaj provoj faritaj pri V. kaŭzis en German- kaj Aŭstrolando kompreneblan malkonfidon al la ideo mem.

La lasta eldono de Volapuko, t. e. la «Idiom Neutral» (kies terminaro povas nomiĝi falsa imitajo de Esperanta vortaro) estas, kiel V. tre malsupera al Esperanto pri simpleco, klareco kaj komprenebleco.

## Alsaluto.

El la Redakcio de *El Dependiente* (organo de l' klubo de komercaj kontoristoj, — en *La Coruña*, Hispanl., riego de Agua, 12, Bajo), (n-ro 14).

«El Dependiente» kore salutas al la tuta gazetaro en la mondo kaj tre speciale al la Esperanta, kies ideon ĝi ĉiam subtenos kaj disvastigos en Hispanujo.

Ni interŝanĝados tre plezure kun la esperantaj gazetoj, ĉar tio estos ankaŭ konvena por la propagando inter la membroj de nia klubo.

Dankojn antaŭe!

*La Redakcio.*

Ni ricevis viziton de «Lingvo Internacia» de Szegzárd (Hungarujo) kaj de «Esperanto» de Santander.



\*) DIREKTORO: E. LOMBARD, HONORA MEMBRO DE S. P. P. E.

## Adresaro de Komercistoj

akceptantaj uzadon de Esperanto.

AVIZO. NUR LA UNUA ENPRESO ESTAS SENPAGA, ĈIU NOVA ENPRESO KOSTAS KVINDEK CENTIMOJN, DEKDU PRESOJ = KVIN FRANKOJN; — POR NIAJ ABONANTOJ: DEKDU PRESOJ DU FRANKOJN.

39. Lyon (Francl.)  
*Joseph Odet* — fabriko de karbonsulfuro kaj kuprosulfaso.
40. Lille (Francl.) 17, rue de la Gare.  
*Union des Producteurs Algériens.* — Vinoj; konjakoj; superaj brandoj. Serĉas agentojn.
41. Paris, 25, rue de Lévis. XVII-e.  
*L'Importation directe* (La senpera enportado). — Kafoj kaj teoj (marko «Le Suprême»). Skribu: 235 Bd. Voltaire, Paris.
42. Crowstand, Assa (Canada) Post Office.  
*Vladimir de Maynov*, komisiisto-aĉetanto; privata sciiganto pri senpagaj teroj kaj ĉiuj komercaj informoj en Kanado. Respon- don pagu nur *per mono*, ne per poŝtmarkoj.
43. Paris, 24 rue de Bondy.  
*Gustave*, kombisto, barbiro; kapzorgisto.
44. Paris, 84—86, Avenue Victor Hugo. XVI. prok- sime de l' arbaro de Boulogne.  
*S-ino Paris*, — Familia pensio; meblitaj ĉambroj kun aŭ sen manĝo.
45. Paris-Plage (Pas-de-Calais) Francl.  
«*Modern Office*». Informoj; asekuroj; vendo aŭ luo de somerloĝejoj, teroj k. c.
46. Cartagena (Hispanl.).  
*Pablo Bosch Martinez*, — komercisto kaj komisiisto.
47. Montpellier (Hérault) Francl.  
*Siméon Courthial*. — Vinoj; Brandoj.
48. Bruxelles, 62 Montagne de la Cour.  
*Spineux k. K-io*, librovendistoj. — Espe- rantaj verkoj.

## Informejo de Esperantistoj.

Fraŭlino S. I. Strauss deziras korespondadi per ilustr. poŝtkartoj, respondas tuj. — Adreso: Rusujo, Ĥ a b a r o v s k, kvartira A. J. Neudatschina.

Deziregas aĉeti ĵarkolektojn de «Esperantisto» kaj «Lingvo Internacia» antaŭ 1900 J. Rhodes, jur- nalisto, Keighley, Angolando.

— Problemojn ni ne presas en la hodiaŭa numero. Solvoj de la problemoj trovataj en la n-ro 9: XV.

KIAM DIO EKKREIS LA VIRON, KIAM LI EKKREIS LA VIRINON,  
LIA FRUNTO EKNEBULIGIS, LI FALIGIS LARMOJN PRO LA ĜOJ,  
EL TIU ĈI NEBULO LA NUBO LA GUTOJ DE TIUJ EĈ NUN ESTAS  
KAJ LA FULMOTONDRO FARIGIS. VIDEBLAJ: LA BRILANTAJ STELOJ.

XVI. Oksikoko. *Divenis*: J. Remy, Josefo Miletz, Ka- jetano Seper, V. Reiner, N. Studenov, K. Bezin, S-ino Caroline Wieslander, Viktor Betulander, S-ino M. Bastoul, kaj Piotr Holodkov.

## Biblioteko de «Lingvo Internacia».

Sub tiu ĉi titolo ni eldonas serion da aparte presindaj eltiraĵoj el nia gazeto, en formato de broŝuro. Nun eliris el la presejo:

==== Kurioza sunhorloĝo de kapitano S. Poljanskij ====

legata en tiu ĉi numero. — Kostas 36 centimojn.

Oni ricevas ĝin: 1) de la ĉefredaktoro de L. I., 2) de la direktoro de L. I., 3) de la Grupo Esperantista Pariza (10, Place de la Bourse, 10, au Touring-Club), en Paris.

«Lingvo Internacia.»

### «KALEIDOSKOPO DE ESPERANTISTOJ»

internacia, riĉilustrita humora gazeto, elsendos dum decembro 1902 sian provan numeron. =====

La «KALEIDOSKOPO» volas per vortoj kaj figuroj eternigi la konvenan ŝercon kaj satiron.

Originalaj konkursoj estos aranĝataj, kaj grandaj sumoj estos disdonataj, — ĉio por la Esperanta afero.

Laŭcelaj alportajoj estos akceptataj kaj pagataj. Provan numeron oni ricevas senpage.

Adolf Berge,  
Askersund.

G. Palm,  
Varmlösa, Rydsgård.

**Rimarko.** PROVAN NUMERON ONI MENDU ĈE ADOLF BERGE (ASKERSUND, SVEDUJO). TIUJ, KIUJ MENDIS PROVAN NUMERON DE „UNGHERRARNES EGEN“, SENMENDE RICEVOS TIAM ANKAŬ DE „KALEIDOSKOPO DE ESPERANTISTOJ“.

### Rusaj Esperantistoj!

Nia fervora samideano S-ro M. S. Rakitski donacis por L. I. 100 ekzemplerojn de sia verko

#### Mjetod obučeniĵa gramotje

(Metodo por instruado de skriboleĝo). La verko estas ricevebla de la kaskisto de l' Societo Espero, en S. Peterburgo (Kriukov kan. d. 27, kv. 6, S-ro V. Kurmanajev), kaj ĝia prezo estas 50 kop., por Esperantistoj 45 kop.

## «L' Espérantiste»

Organo de la Societo por la propagando de Esperanto fondita en 1898.

DIREKTORO: L. DE BEAUFONT. SEKRETARIO: RENÉ LEMAIRE.

Eliras po 16 paĝoj ĉiumonate, tekstoj en la lingvoj Esperanto kaj franca, kun Aldono 4-paĝa tute en Esperanto.

La plej bona maniero por aboni ĝin estas enskribigi sin en la S. p. p. Esperanto: 5 frankoj jare.

Por ricevi n-ron specimenon, oni sin turnu al S-ro Edouard Bréon, sekretario de la S. p. p. Esperanto, 6, rue du Levant, à Vincennes, près Paris (kun poŝtmarko por la respondo).

S. Strömberg en Göteborg (Svedujo), 2, Langgatan 11, deziras korespondadi per ilustritaj poŝtkartoj. ○ ○ ○ ○ ○ ○ ○ ○ ○ ○

### I. C. C. P.

Monata Revuo por la kolektistoj de poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj. Oni ricevas korespondojn sur ĉiuj aferoj rilatantaj al markoj kaj kartoj.

La eldonantoj de poŝtkartoj estas petataj sendi ekzemplerojn de iliaj novaj kartoj kun la komercaj prezoj. Oni deziras ricevi fremdajn gazetojn pri poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj. Abonprezo: 3 F-koj ĉiujare.

==== Adreso: =====

ICCP. 4, Str. Royer-Collard, Paris. France.

Oni korespondas en Esperanto.

Akvo fortiga kontraŭ falo de haroj kaj haŭtpecetoj.

==== AGAS CERTE KAJ RAPIDE. =====

Firmo Vandam, 24, rue de Bondy, Paris.

Oni korespondas en Esperanto.

## Oni abonas L. I.

ĉe

L' administranto de la gazeto  
S-ro PAUL de LENGYEL  
en Szegzárd (Hungarujo).

La redaktoro de la gazeto  
S-ro PAUL FRUICHTIER  
27 Boulevard Arago 27  
en Paris (Francujo).

D-ro L. ZAMENHOF  
ul. Dzika N° 9  
en Varsovio (= Warszawa)  
(Rusujo).

S-ro P. AHLBERG  
Sekretario de Klubo Esp.  
Döbelngatan 50.  
en Stockholm (Svedujo).

**Kosto de abono por jaro:** 5.75 frankoj = 5.50 hungaraj kronoj = 4 skand. kronoj = 4.50 germanaj markoj = 2 rubloj. Unu numero kostas 50 centimojn. Abonoj estas akceptataj de l' komenciĝo de ĉiu monato. Poŝtmarkoj estas akceptataj nur por 3/4 de ilia valoro.

**Pago por anoncoj:** 30 centimoj = 30 heleroj = 22 oeroj = 24 pfenigoj = 12 kopekoj por duonpaĝa petittinio; ĉe pli granda anoncado estas donata rabato laŭ reciproka konsento. — Pagi por anoncoj oni povas ĉe la kvar suprenomitaĵoj, sed la tekston oni sendu nur al la administranto aŭ al la redaktoro.

**AVIZO GRAVA.** Manuskriptojn oni sendu nur al la redaktoro, kies nomon oni devas ĉiam skribi. Nepresitajn manuskriptojn ni ne resendas.